

SE VI HAVUS KREDON! – Komento al Evangelio de p. Alberto Maggi OSM

El la evangelio laŭ Luko 17, 5-10

En tiu tempo la apostoloj diris al la Sinjoro: „Kreskigu en ni la kredon!”

La Sinjoro respondis: „Se vi havus kredon tiel malgrandan kiel semero de sinapo, vi povus diri al ĉi tiu morusarbo: ‚Elradikiĝu kaj ekplantiĝu en la maron’, kaj ĝi obeus al vi.

Se iu el vi havas serviston plugantan en la kampo aŭ paŝtanta la ŝafojn, ĉu vi dirus al li, post kiam li revenis el la kampo: ‚Venu tuj kaj sidiĝu por manĝi kun mi’? Tute ne; sed vi diras prefere: ‚Preparu al mi manĝon, refaldu viajn manikojn kaj servu al mi, ĝis mi satmanĝos kaj trinkos; kaj poste manĝos kaj trinkos vi.’ Kiam la servisto plenumis la ordonojn, la domomastro ne havas devojn al li.

Tiel estas ankaŭ kun vi! Kiam vi faris ĉion, kio estis ordonite al vi, diru: ‚Ni estas nur senutilaj servistoj: ni faris tion, kio estis nia devo.’”

En la evangelio de Luko Jesuo prezentas du bildojn de la ĉiutaga vivo, pri la rilato inter servistoj kaj ilia mastro, sed tute malsamaj. Eĉ kontraŭaj.

En la unua, en ĉapitro 12 de tiu ĉi evangelio, Jesuo parolas pri iu mastro kiu, revenante hejmen malfrunokte, kaj trovante la servistojn ankoraŭ vekajn, kion li faros? Ne nur li ne lasos sin priservi, sed li mem ilin priservos. Estas la bildigo de la Eŭkaristio, kie la Sinjoro, al tiuj kiuj decidis meti sian vivon je la servo de la aliaj, komunikas sian saman amkapablon, por praktiki sian servadon pli intense kaj sindoneme.

Ĉi tie, male, en la peco kiun la liturgio prezentas al ni hodiaŭ, en la ĉapitro 17 de Luko, versikloj 5-10, la bildo kiun Jesuo prezentas estas tute alia. Temas pri mastro kiu, kiam la servisto revenas de la kampo, pretendas esti servata. Kaj li eĉ diros: *"Kiam la servisto plenumis la ordonojn, la domomastro ne havas devojn al li."*

Kial ĉi tiu malakordo? Kion tio signifas?

Ni do tion vidu en ĝia kunteksto. Jesuo invitis siajn disĉiplojn esti "filoj de la Plejaltulo", simili al Dio. Kaj kiel oni similas al Dio?

Jesuo diris: "Estu kompatemaj samkiel via Patro estas kompatema". Kaj la praktikadon de la kompato Dio manifestas per la ĉiam allasita pardono, senpaga pardono, fruigita pardono. Kaj Jesuo petas de la disĉiploj ĉiam pardoni.

Jesuo diros al siaj disĉiploj ke *"se po sep fojojn tage iu diras al vi 'mi pentas' vi..."* – kaj li uzas la imperativon – *pardonu lin*". Jesuo do volas igi siajn disĉiplojn filoj de Dio, tute liberaj, sed por tion fari necesas kapabli je amo simila al tiu de la Sinjoro.

Kaj la praktiko de la senpaga pardono estas ties pruvo. Por tion fari tamen necesas forlasi tiun rilaton servisto-Sinjoro, per la obeo al la leĝo, kiu estis parto de la antikva interligo. Moseo, la servisto de la Sinjoro, trudis interligon inter servistoj kaj ilia Sinjoro, bazitan sur la obeo al lia leĝo. Jesuo, la filo de Dio, proponas novan rilaton inter filoj kaj ilia Patro, bazitan sur la akcepto kaj simileco al la amo de la Patro.

Por Jesuo la kredanto ne plu estas tiu kiu obeas Dion observante liajn leĝojn, sed tiu kiu similas la Patron, praktikante amon similan al la lia. Se la disĉiploj ne agas tiel, se la disĉiploj ne kapablas je tiu kompato kiu manifestiĝas per la pardono, ili restas en la stato de servistoj. La hodiaŭa peco do metas la disĉiplojn antaŭ alternativo: daŭrigi laŭ la malnova tradicio esti servisto de la Sinjoro sen neniam sukcesi percepti lian amon, kaj do nekapablaj tion poste komuniki al la aliaj, aŭ akcepti la novaĵon alportitan de Jesuo, esti filoj de Dio, tute liberaj.

Kaj la libero manifestiĝas per la senpaga amo kaj per la pardono allasita al ĉiuj.